



Trian fojon en Krakovo, Pollando

Sed ne por admiri la urbon, ĉar por tio pro la abunda programo ne restis la tempo. Tamen, Vlasta sukcesis trovi kelkajn horojn kaj polan akompanantinon por viziti almenaŭ la imponan reĝan kastelon Wavel kaj la admirindan ĉefan placon.

Jam la trideksesan fojon okazis la Esperantaj Tagoj en Krakovo, gastigitaj denove en la Kulturcentro Podgorza. Ĉi-jare, inter la 6-a kaj la 8-a de junio, nia ĉeĥa-moravia-slovaka triopo Eva, Anja kaj mi, kompletigita per plua bohemanino Vlasta el Benešov, ĝuis la diverstemajn prelegojn vendrede kaj sabate. La dimanĉo estis destinita por la ekskurso, sed tiun tagon ni jam reveturis hejmen (ĉi-foje per trajno) .

Per kelkaj vortoj kaj fotografiaĵoj, kun ĉeesto de lia filo, la partoprenantoj rememoris la forpasintan samideanon Leszek Kordylewski.

Ĉi-jare oni ekuzis ankaŭ la eblecon akcepti la prelegantojn per komputilo. La belgo Lode Van de Velde atentigis nin pri kemiaĵoj en niaj manĝoj kaj medio. Przemek Grzybowski per sia interese ga prezentaĵo kun multaj fotoj konvinkis nin, ke por travivi militon estis bezonata rido ne nur en la ĵurnaloj, trinkejoj kaj teatroj, sed ankaŭ sur la militkampoj mem.

En la programo ne povis manki filmoj de Roman Dobrzyński. La vendreda programo temis pri la pasintjara afrika Universala Kongreso, la sabata pri la vivo de indianoj de la lago Titikako.

Lidia Ligęza deklamis por ni kelkajn siajn tradukojn el la Plorkantoj, Kantoj kaj Epigramoj de la verkisto Jan Kochanowski. Paweł Dzienis atentigis nin pri la ebleco akiri monon por la projektoj de „malgrandaj patrujoj“ kaj prezentis kelkajn el ili; ekzemple en Bjalistoko oni kreis malgrandan Varsovion, uzante kelkajn nomojn de ties stratoj.

La naturan kaj kulturen heredaĵon de la pasintjara kongreslando Tanzanio prezentis al ni per bildoj kaj vortoj Magdalena Tatara kaj Robert Kamiński. Pri interesaĵoj de Malagasio parolis Ulrich Matthias. Ewa Katarzyna Corominas per multaj bildoj kaj interesa parolado proksimigis al ni sian veturadon al Ĉinio. En Ĉinio ni restis ankaŭ dum la prelego de juna studentino en la poznana universitato Fan Yang, Esperantnome Jujuba, kiu prezentis al ni la Esperanto-muzeon en Zaozhuan.

De Grzegorz Słowiński ni eksciis multegajn interesaĵojn pri la sciencisto Juan Caramuel, de Irek Bobrzak nekonatan historion pri Bernard Stollman. Mariusz Rado prezentis al ni planedon Venuso kiel fratino de la Tero.

Włodimierz Opoka atentigis pri la interretaj fabeloj por plenkreskuloj, kiuj fakte misgvidas al aĉetado de diversaj kvazaŭkuraciloj.

Anna Cisło prezentis al ni nekutiman irlandan skribon en libroj, stratoj kaj menso. Maria Majerczak el la loka universitato prezentis al ni rezultojn de aŭtomata skribado en Esperanto faritaj fuŝe per artefarita intelekto kaj fakte en misaj vortoj kaj literoj ni povis malkovri la zamenhofan poemon La Vojo. Krome ŝi pridonacis nin per reklammaterialoj de la universitato.

Magdalena Tatara prezentis al ni pollingvan lecionon de Esperanto.



Al mi tre plaĉis prezentaĵo de Adam Wilkus pri la stilo Nova Arto (germanlingve „Secession“) ĝenerale kaj speciale en arkitekturo kaj arto de Krakovo. Alia por mi interesa prelego estis tiu de Edward Malewicz, kiu respondis al la kritikinto de sia lernolibro por komencantoj, klarigante, ke tion, kion tiu taksis esti gramatikaj eraroj, uzadis en siaj verkoj ankaŭ Zamenhof mem kaj aliaj lingvaj personecoj. Ilona Koutny, iama respondeculino pri Esperanto-studoj en la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano, kiuj, bedaŭrine, pasintjare ĉesis, parolis tiel interese pri internacia lingva ĝentileco kaj sekvaj enketaj esploroj, ke nur post la rimarko de Eva mi eksciis, ke ŝi uzis pli multan tempon, ol estis por ŝia prelego destinita. Simile interesa estis la prelego de alia poznanano Michael Faris pri naciaj kaj internaciaj signolingvoj, kiuj tute ne estas samaspektaj.

Kiel kutime, sabaton posttagmeze en loka preĝejo ni povis partopreni sanktan meson en Esperanto danke al Roman Gmyrek. En apuda ĝardeno antaŭ la preĝejo oni poste povis admiri

interesajn modernajn skulptaĵojn kaj belan robon de la freŝbakita novedzino.

Ne mankis kulturaj eroj. Sabate, Lidia Komar, konata ankaŭ al la partoprenintoj de la Someraj Esperantaj Studadoj kiel kantistino de la ensembloj Junaj Voĉoj kaj E-Familio, kiujn ŝi rememoris ankaŭ voĉe kaj per fotografaĵoj, prezentis al ni naŭ kantojn en Esperanto, inter ili ankaŭ la konatan „Estu ĝi“. Dimanĉon ni ĝuis pian-ludan recitalon de la fratinoj Aleksandra kaj Julia Czajka.

Ĉi-jare, vendrede, en amikeca rondo ni gustumis koreajn manĝojn. Sabate nia kvaropo malkovris polan restoracion kun bongustegaj pirogoj kaj „kolombetoj“, kio ne estis la birdoj, sed miksaĵo el rizo kaj viando envolvita en brasika folio kaj kuirita en tomata saŭco.

Ni loĝis en subtegmenta apartamento proksime de la ĉefa placo de tiu urbokvartalo. Tio ebligis al ni sekvi la fortegan fulmadon, kiu nokte tute blankigis la firmamenton. Dank' al Dio, ĝi okazis tiom fore, ke ni eĉ ne aŭdis la tondrojn. Endormigis nin poste forta nokta pluvo frapanta al la tegmentaj fenestroj. Nura manko de ĉi tiu loĝoĉambro estis, ke gvidis al ĝi tro da ŝtupoj!

Tamen, entute nia kvaropo estis tre kontenta kun nia restado kaj laŭdis la elstaran laboron de la organizantoj. Jam en la tramo, veturante al la fervojstacio, ni interkonsentadis pri la venontjara reveno.

Ĉu iu sileziano aldoniĝos al ni por kompletigi reprezentadon de nia iama ĉeĥoslovaka patrujo?

Magdaléna Feifířová (Fejfi) Źilina,
2025 06 11